

N. N. 13,

## Trinka kanto

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

1. Fratoj, al festeno bona Dio  
Kunvenigis nin en kanta ĥor',  
Ĉiun zorgon tuj per energio  
Ni kuntrinkantuloj ĉasu for!  
Kie ŝaŭmas vin',  
Ĝoj' florigas nin  
Kiel de l'printempo bela flor'.

2. Gaje ni traĝoju la junecon  
Kun amikoj bonaj en kunven',  
Ili donu al ni kontentecon,  
Kaj la vino estu kora ben'!  
Per vinbera fort'  
Kontraŭ iu sort'  
Ni jen armigitaj de deven'!

3. Ne trinketu nur el la pokalo,  
Kiam plena estas la barel',  
Kiu ĝuas vivon tute en tervalo,  
Ne konscias pri vivada cel'!  
Vigle trinku do!  
Malplenigu, ho!  
Plua pleno kuŝas jen en kel'!

...

N. N. 13,

## Trinklied

1. Brüder, zu den festlichen Gelagen  
hat ein Guter Gott uns hier vereint;  
allen Sorgen lasst uns jetzt entsagen  
trinken mit dem Freund, der's redlich meint.  
da, wo der Neckar glüht, valleralla!  
holde Lust erblüht, valleralla!  
wie die Blumen, wenn der Frühling scheint

2. Lasst uns froh die gold'ne Zeit durchschwärmen  
hängen an des Freundes treuer Brust;  
an dem Freunde wollen wir uns wärmen  
in dem Weine kühlen unsre Lust!.  
In der Traube Blut, valleralla!  
trinkt man deutschen Mut, valleralla!  
wird der Mann sich hoher Kraft bewusst

3. Nippt nicht, wenn Bacchus' Quelle fließet  
ängstlich an des vollen Bechers Rand,  
wer das Leben tropfenweis genießet  
hat des Lebens Deutung nicht erkannt.  
Nehmt ihn frisch zum Mund, valleralla!  
leert ihn bis zum Grund, valleralla!  
den ein Gott vom Himmel uns gesandt!

...

4. Kun lumama sento la junulo  
 Bonkuraĝe venas tra vivad',  
 Kaj kun amikeco la kunulo  
 Li turnadas laŭ destina rad'.<sup>2</sup>  
 Vi do fidu min:  
 Ĝis de l'mondo fin'  
 Estos mi fidela kamarad'!

5. Ne sen uz' pasigu la junecon.  
 El pokalo laŭ konata fam',  
 Vi elĉerpos veran la belecon:  
 Ĉe knabina brusto kora am'!  
 Kiam lasos nin  
 La junec' kaj vin',  
 Nin akceptu, Ĥaron, via pram'!

*Traduko de la Germana poemo "Trinklied" de N. N. 13 en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-02-16 – †1919) en 1907.*

*Arg-399-790 (2007-03-29 09:44:07)*

*La esperantigon de tiu ĉi kanto mi, Manfred Retzlaff, trovis en la kant-libreto "Esperantista kantaro", kolekto unua: Germanaj kantoj popolaj kaj studentaj, Esperantigitaj de L. E. Meier, verkisto. La kantlibro estas eldonita en 1907 de la eldonejo Hans Theodor Hoffman, Berlin W 35, Steglitzer Straße 44.*

4. Auf des Geistes lichtgewohnten Schwingen  
 stürzt der Jüngling mutig in die Welt;  
 wackre Freunde will er sich erringen  
 die er fest und immer fester hält.  
 Bleibt die Meinen all', valleralla!  
 bis zum Welteinfall, valleralla!  
 treu dem Freund auf ewig zugesellt!

5. Lasset nicht die Jugendkraft verirauchen  
 in dem Becher winkt der goldne Stern.  
 Honig lasst uns von den Lippen saugen  
 Lieben ist des Lebens süsster Kern.  
 Ist die Kraft versaust, valleralla!  
 ist der Wein verbraust, valleralla!  
 folgen, alter Charon, wir dir gern!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 13, publikigita 1821.*

*Arg-399-788 (2007-03-29 08:54:37)*

*Entnommen aus den Netzauftritt <http://www.volksliederarchiv.de/text1714.html>. Dort ist angegeben: Text: In den Breslauer Burschenliedern 1821 Musik: "Sind wir nicht zur Herrlichkeit geboren", un Serigs Ausw. dtsh. Lieder 1825 in "Allgemeines Deutsches Kommerzbuch".*

---

<sup>2</sup>pli bone eble:

Sin turnadas laŭ destina rad'.

(La verbo "turni" ja estas transitiva kaj bezonas objekton.)